*Fiŝamiko al li diris "Ne tre gravas la distancoj;*
*Aliborde estas ja alia lando kaj la Francoj!*
*Ju pli longen de Anglujo, pli apude al Francujo!*
*Do, ne timu! Ĉar sur ambaŭ bordoj jen por vi patrujo.*
*Vi konsentas, ĉu ne vere? Vi konsentas partopreni?*
*Vi konsentas, ĉu ne vere? Ho, konsentu partopreni!*

Kiam la dancado finiĝis, Alicio interne sentis ke ĝi estas teda kaj eĉ ne sendanĝera por ŝi; tamen ŝi diris ĝentile :—

"Mi tre dankas; mi tre interesiĝis vidante la dancadon; kaj speciale plaĉis al mi tiu kurioza kanto pri la merlango."

"Ho, pri la merlangoj" diris la Falsa Kelonio "vi kompreneble vidis ilin?"

"Jes" Alicio respondis "tre ofte mi vidis ilin en *la frit*——"

"Pri *Lafrito*, mi ne scias kie sidas tiu urbo" diris la Falsa Kelonio "sed se vi tre ofte vidis ilin, vi kompreneble konas kian aspekton ili havas?"

"Mi kredas ke jes" diris Alicio, konsiderante. "Ili havas la vostojn en la buŝoj; ankaŭ ili estas kovritaj per paneroj."

"Pri la paneroj vi eraras" diris la Falsa Kelonio "ili ne povas pro la marviŝo teni panerojn sur la korpo. Sed pri la vostoj vi *ne* eraras, kaj la kaŭzo ja estas——"

En tiu momento la Falsa Kelonio oscedis kaj fermis la okulojn, dirante al la Grifo: "*Vi* diru al ŝi pri la kaŭzo kaj ĉion tion."



"La kaŭzo estas" diris la Grifo
sistis iri danci kun omaroj; do,
malproksimen en la maro; do
longan falon; do, la vostoj fiksiĝis
kaj oni ne povis malfiksi ilin; do—
"Mi dankas" diris Alicio "tio
tre interesa. Ĝis hodiaŭ mi sciis
pri merlangoj."
"Mi povas diri al vi pli ol tio, se
diris la Grifo. "Ĉu vi scias kial o
fiŝon merlango?"
"Mi neniam pripensis tiun dem
Alicio. "Kial do?"
"Ĉar ĝia lango estas ĉiam en la n
la Grifo "kaj la maron ĝi prefer
'e' nur pro ĝia partianeco por la
kredeble rimarkis per kia sopira
'*pli apude al Francujo.*'"
(En la angla teksto li tute al
nomon. Por ekkompreni ĝin, oni
en la pensoj la vortojn "merlango
gilo" kiuj en angla lingvo havas
*ŭhajting*. Jen la teksta dialogo :-
"Ĉu vi scias kial oni nomas ĝi
diris la Grifo.
"Mi neniam pripensis tiun de
Alicio. "Kial do?"
"Ĝi poluras la bot-kaj ŝuojn" d
la Grifo.

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTE